

Heinrich Heine,
Lorelej

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Ne scias mi, kial subita
malgaj' en la koro naskiĝis;
el tempo jam enterigita
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,
la Rejno mallaŭte babilas,
per oro de l'sun' en vespero
la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:
en ora ornamo brilante,
sur supro de l' monto ŝi sidas,
la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas
kaj kantas tra l' pura aero,
kaj forto mirinda sin trovas
en tiu ĉi kant' de l'vespero.

Ŝipet' iras sur la rivero,
ŝipisto ekstremis de l' kanto,
kaj blinda por ĉiu danĝero
rigardas li al la kantanto.

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela
perdiĝis sub l' akvoturnado;
ĝin Lorelej' faris kruela,
per sia mirinda kantado.

...

Heinrich Heine,
Lorelejo

tradukita de Joachim Gießner

Malgajon mi sentas en koro,
sed kial tia tim' ?
Legendo el pratempa foro
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en malhelo,
kaj malvarmetas l' aer' .
Sed brilas la mont' en orbelo
pro suna lum' de l' vesper'.

Jen supre kabino provokas
per ora juvelar',
kaj ŝia beleco allogas
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige,
sirene kantas ŝi
per neimagebla, mirige
potenca melodi'.

Ŝipiston en eta boato
Turmentas koremoci' .
Ne ĝenas lin rifo-kaskado,
rigardas nur supren al ŝi!

Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo
la ondoj lin kun boat' .
Nun kuŝas li en la profundo
pro Loreleja kantad'.

...

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kant-kolekto “Mia kantaro I”, eldonita de Josef Schiffer (Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: Josef.Schiffer@t-online.de), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo “Fervoja Esperantisto” de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.